AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 23-1-81

7-a jaro MARTO/APRILO 1952 n-ro 3/4

N I E S T U F I D Ĉ L A J

Oni ne povas nei, ke multaj el niaj samideanoj estas nekontentaj pri la aktuala evoluo de nia movado. La kursoj jam de kelka tempo ne prosperas, la anaro de la grupoj malkresketas, kelkaj grupoj eĉ likvidiĝis, novaj preskaŭ ne fondiĝis kaj la publiko ĝenerale ne tre atentas nian aferon, kvankam la oficialaj instancoj jam pli ol iam estas pretaj, subteni nin.

La samideanoj en la grupoj, se ne kulpigas, tamen kulpetigas la estraron de nia federacio, ke ĝi malzorgas la propagandon, ne sufiĉe peticias la oficialajn instancojn, ne konkeras la diversajn organizaciojn, la gazetaron, do, ke ĝi ne estas aktiva.

La estraro siaflanke kun zorgo observas la malkreskon de la organizita anaro, kio multe malhelpas ĝian laboron. Nombris ja AEF en la jaro 1946 proksimume dumilkvincent membrojn, dum nun estas malpli ol mil, eble okcent. Tio kondicas, ke la Centro malpli enspezas ol ĝi devus elspezi. Restas ja diversaj pagdevoj konstantaj, ĉu la federacio estas multmembra aŭ ne, kiel la kostoj por ejo, telefono ktp. Ankaŭ la preskostoj por la Revuo restas relative altaj, ĉu la eldonkvanto estas pli ol dumil aŭ malpli ol mil. Vere la estraro deziras eldoni presitan, grandformatan, multpaĝan, enhavoriĉan, ilustritan revuon monatan, anstataŭ tio estas danĝerigata jam la nur litografita revueto dumonata. Pro tio la estraro ne estas malpli malkontenta ol la funkciuloj kaj membroj en la grupoj.

Kie regas malkontenteco, tie baldaŭ ekestas disputo, ekregas malpaco kaj en la konsekvenco minacas disiĝo kaj separatismo. Sed tia sento ne devas esti! Ĝi tro facile povas fariĝi la komenco de plena detruiĝo de la Esperantomovado en nia lando.

Ni principe devas kompreni, ke la nuna, tute ne stabiliĝinta tempo tre malfavoras kulturajn agadojn. La homoj fariĝis tro skeptikaj kaj realsimaj, momentaj ĝuoj kaj praktikaj akiroj ĉe ili pli valoras ol idealaj aferoj. Tiun ĝeneralan influon subvenis ankaŭ nia movado. La kurbo de la kultura evoluo de la civilizita homaro kliniĝis valen kaj ni devas atendi ĝis ĝi denove suprengrimpas monten. Sed ni intertempe ne devas fariĝi dubemaj, pesimismaj, laciĝintaj; sed ni devas kolekti niajn fortojn por la momento de pli favoraj cirkonstancoj, kiuj ebligos al ni venkigi nian ideon internacilingvan, venkigi nian Esperanton.

Certe rajtas kaj eĉ necesas kritiko en niaj propraj vicoj. Certe kelkaj el niaj funkciuloj kaj iamaj aktivistoj estas influataj de la ĝenerala skeptikismo, laciĝis pro manko de sukceso de siaj penadoj aŭ eble jam tro maljuniĝis korpe kaj spirite. Certe ni havas la rajton, eĉ devon, anstataŭigi ilin per novaj homoj aktivemaj, ankoraŭ laborkapablaj kaj ne jam eluzitaj. Certe ankaŭ la sidejo de la estraro ne nepre devas resti en Vieno, se aliloke troviĝas gesamideanoj, kiuj sentas ĉe si la kapablon kaj forton pli bone estri nian movadon. Certe reorganizado de nia movado estas ebla, eble necesa. Sed - tio devas okazi en la kadro de nia organizacio mem. La venonta ĝeneralkunveno de AEF estos la sola forumo por diskuti, proponi kaj decidi pri tiuj problemoj. Kiu neglektas tiun laŭstatutan procedon, kiu pro seperatismaj ideoj kaj aspiroj forlasas la esperantistan federacion, farigas entombiganto de la Esperantomovado en Aŭstrio.

Se ni ne estus okcent organizitaj Esperantistoj, sed, ni diru, okmil, ni povus toleri la luksON, havi du aŭ pli multajn organizaciojn. Sed ĉar ni nun nur estas areto, estas grava ĉiu unuopulo. Tial ni reorganizi laŭ neceso kaj eblo nian federacion, sed ni restu fidelaj al ĝi. Sole en la unueco kuŝas ja nia forto.

-mm-

VIENA TIPAĴO:

La Fera Viro sur la urbdomo de Vieno.

Nia bela urbo posedas multajn vidindaĵojn. Konatajn kaj malpli konatajn. Inter ili estas ekzemple la "Fera Viro sur la urbdomo". Ĉiuj konas ĝin, sed kiu scias pli multe pri ĝi, ol ke ĝi estas simple Fera Viro sur la urb domo? Tiu ĉi Fera Viro staras sur la nova Viena urb= domo, kiu laŭ la planoj de la preĝej-konstruisto Fried= rich Baron von Schmidt estis finkonstruita en la jaro 1873. Mi diru pli detale: Ĝi staras sur la pinto de la 109 metrojn alta mezturo de la gotika konstruaĵo. Ĝi est= as 3 metrojn granda, pezas 45 centfuntojn kaj estis fin= ata dum unujara laborado en la laborejo de la serurmajs= tro Ludwig Wilhelm de ties helpisto Alexander Nehr.

Disvastigita estas la eraro, ke la Fera Viro reale estas el fero; ne, ĝi konsistas el kupro kaj en la kroni= ko de la Viena urbdomo ĝi estas nomita "kupra standardo= portanto". Sed jam la tiamaj Vienanoj ŝajnis neentuzias= migeblaj per standardoj, standardoportantoj aŭ standardo= gvidantoj kaj tial la nomo aliiĝis al la hodiaŭ konata formo.

Estis malfacile, suprenigi la gigantan figuron al ĝia falemiga alta loko. Unue oni projektis suprentiri la unuopajn partojn, sed tio malsukcesis kaj poste oni kon= struis fortajn levilojn kaj tirilojn. En kaĝo el kverkaj tabulegoj kaj feraj reloj, ĉirkaŭligite per brakodikaj ĉenoj, ĝi komencis sian danĝeran suprenveturadon. Preskaŭ la tuta loĝintaro de Vieno partoprenis la ekscitan okazaĵon. Sed la afero sukcesis bone kaj tiu simbolo de Vieno estis muntata tiel, ke ĝi estas movebla, elasta laŭ la vento kaj eĉ ventego kaj ete vibranta.

Post la starigo oni festis la solenan momenton sur la altsituа trabaĵo per parolado al la Fera Viro sur la turo de la urbdomo: Ĝi kontraŭstaru ĉiujn ventegojn kaj protektu la urbon Vieno. Fine la legendo rakontas ankaŭ, ke la vinglaso, per kiu oni tostis por felica estonteco, kiam ĝi estis laŭ tradicia kutimo ĵetita de la turpinto, ne dispeciĝis. Ĉu tio estu bona antaŭsigno por nia Vieno?

Robert Novaĉek.

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

NIA HONORPREZIDANTO, sekcia ĉefo d-ro DWORSCHAK, festis antaŭ nelonge sian 25an dejor-jubileon. La AEF-estraro direktis al li leteron kun koraj gratuloj, kiun nia estimata honorprezidanto afable respondis.

La estraro de AEF permesis al si, letere saluti d-ron K o l b , la novan aŭstrian instruministron, kaj informi lin koncize pri la aŭstria E-movado. D-ro Kolb dankis al AEF per afablaj linioj.

Agnoskante la kulturan valoron de nia movado kaj speciale la aktivadon de AEF en instruista medio, la Aŭstria Instruministerio subvenciis nian landorganizon per la sumo de S 1.000.-. La estraro de AEF esprimas al niaj akcelantoj en la ministerio la koran dankon.

El la protokoloj de la AEF-estrarkunsidoj 1.2.3/52. Popola Altlernejo Margarethen deklaris, akcepti nian novan varbfolion kiel aldonaĵon por la instituta bulteno. La estraro decidis, disponigi tiucele nur la ekzemplerojn, kiuj restos. Bv. do tuj mendi, se vi nakoraŭ ne faris tion, aŭ se vi ankoraŭ bezonos novan kvanton! - Instigite de la agmaniero de Sveda E-Federacio, kiu dissendas la protokolojn de siaj estrar-kunsidoj al la aliaj landaj E-asocioj, la estraro de AEF decidis laŭ propono de d-ro Grimme, ke la Federacio verku kvaronjaran resumon de la protokoloj, kiu estu sendata al la internaciaj E-organizoj kaj al la landaj organizoj, kiuj samagas kiel ni. - La raporto de la kasistino entenas la sciigon ke "Verda Stelo" Salzburg, kontraŭe al la decido de la lasta jarkunveno, kiu fiksis la kotizon je S 1.50 pomonata, pagas al AEF po membro nur S 1.--. - La Fervojista fakgrupo de AEF ricevis de la fervoja administracio la permeson, fiksi tabulojn kun la indiko de la adreso de E-istoj de la lokoj, kiuj pretas doni informojn al la vojaĝantoj. Simila permeso ekzistas de la post-administracio por la oficejoj, en kies lokoj estas E-istoj, kiuj deklaras, ke ili volas transpreni la E-servon. - La kasraporto de la 20a de februaro evidentigis saldon de S 979'04. -Por la gazetservo denove funkcias s-ano Franz Jeitler. Ges-anoj, kiuj disponas pri materialo, aperiginda en la nacilingva gazetaro, bv. ĝin sendi al la Centro.

Nia Zamenhof-monumento en Wörgl. La 27.7.52 estas la grava dato por la granda solenaĵo honore al nia Majstro! Jam nun zorgu pri libertempo kaj ŝparu por la vojaĝo! Tuj anoncu vin al la komitato pro dumnokta restejo kaj sendu vian kontribuon por la monumento al: s-ro Hans Steiner, Wörgl, Augasse 42, resp. al Postsparkassa-Konto Nr. 194.436 de Hans Steiner, Wörgl, Tirolo. "Informletero" de februaro/52 notis la adresojn de 301 donacintoj (individuoj kaj grupoj). Detalojn vidu en AER 1-2/52!

Aŭstria Societo de la amikoj al E. (Ö.G.d.F.d.E.) reaktivigis. Laborkomitato - estro s-ano dipl.komerc. Bartek, vicestro s-ano stud. tekn. Schalk, kasisto s-ano März. Ĝi petas, transprenu la kvitanco-membrokartojn - (Einhebeblocks), varbu subtenantojn kaj akcelu tiamaniere grave la E-movadon.

Ŝtataj E-ekzamenoj en Vieno okazos komence de majo. Informu vin detale en la E-Centro.

Esperanto en aŭstriaj gazetoj. La estraro de AEF dankas al la verkintoj de jenaj publikigoj: "BERUF UND GESINNUNG", Graz, (V/VI): "Sollen wir E. lernen?" (E. Schrotter) 1 1/2 pĝ.; "ZELT AN DER DONAU" (VI/VII), Vieno, jamborea saluto kaj varbteksto (d-ro Arlow), 31 lin.; "WOCHENPOST" (V), Innsbruck, intervjuo kun d-ro Megalli, 73 lin.; "KALASANTINER BLATTER" (X), Vieno, "Ein Mittel zur Völkerverständigung" (dir. Menacher), 64 lin.; "DIE WELT" (XI), Vieno, "Kath. E-Kongresz in München" (W. Mudrak), 30 lin.; "DIE FURCHE" (10.XI), Vieno, sama temo (Mudrak), 35 lin.; "VOLKSGESUNDHEIT" (XI/XII), Vieno, "Lebensreform und E." (d-ro Görlich), 2pĝ.; "DER OESTERR. STENOGRAPH", (XI KAJ XII), Vieno, stenografia artikolo pri E. (2 pĝ.) kaj "Stenographie und E." (3 pĝ.), verkitaj de E. Werner; "DER EISENBAHNER" (X kaj XI), Vieno, informoj (J. Zink), 30 kaj 40 linioj; "POSTRUNDSCHAU" (XI), Vieno, kursnoto (R. Cech), 12 lin.; "KL. VOLKSBLATT" (26.X.), Vieno, "E-Staatsprüfungen" (dir. de ŝt. E-ekz. komisiono), 10 lin.; "DIE FRAU" (17.XI.), vieno, "Internacia Somera Universitato" (d-ro Grimme), 74 lin.

Esperanto en Radio-Vieno. Sendilo Vieno I: ĉiumerkrede je 22.35 h dum 5 minutoj informoj. Redaktas s-ano Gustav Loibel, parolas s-ano Emil Vokal. Sendilo II: ĉiun duan ĵaŭdon je 18.10 h, 15 minutoj paroladoj. Dum januaro

okazis: parolado pri Alfons Petzold (s-ino Frieda Feichtinger) kaj informservo de la E-fervojistoj (s-roj Zink kaj d-ro Karner); dum februaro parolis s-ano Ernst Werner pri Stefan Zweig kaj s-ano Josef Zink pri fervojistaj aferoj.

10.000

Tio ne estas la nombro de nia anaro, ne la nombro de disponeblaj ŝilingoj, ĝi sole estas la eldonkvanto de niaj varbiloj. La memkostoj estas 15 groŝoj po peco. La estraro, uzante la enspezojn per la propaganda fonduso, decidis fordoni ilin je 10 groŝoj po peco. Ĝis nun vendiĝis 5500 folioj. Restas do sufiĉa kvanto. Sed nur, se ĉiuj ekzempleroj estos venditaj, la centro povos inici-ati la eldonon de novaj varbiloj. Se ĉe proksimume mil aktivaj esperantistoj en Aŭstrio (kaj vi ja certe ne dubas pri tiu nombro!?) ĉiu aĉetus nur 10 pecojn por 1 ŝilingo, la tuta eldonkvanto estus elĉerpita. Ke la varbfolio estas bone uzebla, montras la ekzemplo de tiuj gesamideanoj, kiuj disdonis la 5500. Eble oni povas kritiki ĝin (kaj la kritikoj, se ili estas trafaj, certe influos novan eldonon), sed neniu serioze povas aserti, ke la varbfolio estas maltaŭga. Kaj ĉar ili jam ekzistas, postulas la disciplino, ke la aktivistoj de nia movado uzu ilin. Tial ni vokas ĉiujn funkciulojn, subteni la vendadon de la restaj 4500 pecoj kaj instigi niajn gesamideanojn, uzi ilin por propagando de nia afero, ĉu en amika rondo, ĉu en laborejo, ĉu ie ajn.

A U S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

Vieno: El la Danubio-Informilo, kiu fidele informadas la anaron de la societo, ni ekscias pri la jarkunveno de ĝi. Estis reelektata la malnova estraro, kiun presidas nun jam 30 jarojn s-ano Raimund Cech. Li skizis la agadon de la pasinta jaro kaj notis 22 kunvenojn de la societo; la membronombro estas 36 aktivaj kaj 5 akcelantaj societanoj; la "Franz Vasta-biblioteko" registras la atendindan nombron de 475 volumoj.

Vizito de la Horlog-Muzeo, Vieno 1.,Schulhof 2, laŭ invito de nia s-ano-direktoro K a f t a n okazos sabate, la 26an de aprilo je la 15a h. Ĉiuj ges-anoj estas kore invititaj!

Nederlanda karavano vizitos Vienon dum somero 1952! la Vienaj ges-anoj estas petataj, disponigi por ili dum 2 noktoj restejojn en nia urbo kaj helpi al la gastoj, beligi ilian feriadon. Anoncojn bv. adresi al la E-Centro.

Atentu la kunvenojn de VED, kiuj, kiel konate, okazas ĉiun Ŝan merkredon je la 17a h en la E-Centro. Zorgu pri tio, ke la grupoj estu plennombre reprezentataj, por ke via landa organizo povu sukcese labori!

La E-grupo "KALOCSAY-LABORO" kaj la E-studrondo de s-ano H. Kraus konforme al la apelo de s-ano Karl Nigl, AEF-landestro de Supra Aŭstrio, en Linz, Prinz Eugenstr. 11, kolektis nutraĵojn por la E-istoj de la Po-regiono. La pakaĵo jam estas survojigita al Linz.

SUPRA AUSTRIO: El la "Spegulo" de s-ano AEF-landestro Nigl ni ekscias,ke en Linz estas gvidataj 3 E-kursoj: 2 kursoj de la Fervojista Fakgrupo kaj 1 de la "Vojaĝklubo". La loka gazeto "TAGBLATT" publikigis kelkajn raportojn pri vojaĝo al Nederlando kaj pri la inaŭguro de la Zamenhof-monumento en Wörgl. S-ano Nigl energie petas la ges-anojn pri la partopreno al la kolektokampanjo por la italaj ges-anoj, viktimiĝantaj per la Po-inundo. Sebdu monon kaj nutraĵojn al lia adreso: Karl Nigl, Linz a/D., Prinz Eugenstr. 11!

STIRIO: "Verordnungsblatt für das steiermärkische Schulwesen", la dekreta bulteno por la stiriaj lernejoj, enhavis en la n-ro 8-9/51 tri artikolojn, koncernantajn Esperanton. Pri "E. kaj UNO" skribis s-ano prof. d-ro Görlich-Vieno;dua artikolo temis pri la Int.E-Muzeo en Vieno; la tria, verkita de s-ano kort. kons. d-ro Wollmann, landa lernej-inspektoro de Vieno kaj emerita iniciatinto de la ŝtata E-ekzamenkomsiono, estis: "E. en la lernejojn" kaj atentigis la stiriajn instruistojn pri la valoro de E. kiel instrufako. -- La tutaŭstria gazeto por invalidoj "DIE QUELLE", aperanta monate en Graz-Andritz,Ursprungweg 146, publikigas ekde januaro 52 regulan E-kurson de s-ano dro Oskar Meister,

ATENTU, GRAVA PETO! Laŭ informo de s-ano Eder okazos en Graz turisma ekspozicio dum 1953. Li ricevis la promeson, ke la grupo rajtos starigi Esperanto-standon! Por tio ĝi bezonos multan taŭgan materilalon, kiu pref. estu n o v a . Helpu ĉiuj kolekti por tiu grava afero kaj sendu al: Esperanto-Societo "UNUECO", Graz, Sackstr. 16/1! - "L'ESPERANTO", organo de Itala E-ista Federacio, citas en n-ro 11-12/51 kondolencan leteron de s-ano AEF-landestro por Stirio d-ro Halbedl, kiu esprimas lian profundan kunsenton kun la najbarlandaj viktimoj. -- LA SEKRETARIEJO DE LA VATIKANŜTATO dankis d-ron H a l b e d l en la nomo de la Papa Moŝto pro alsendo de la libreto: "Papo Pio X-a Beata" per apostola beno; "sed koncerne la peton pri akcelado de E. per la Sankta Seĝo", skribis la ŝtatsekretario, "mi bedaŭras la devon pri informo, ke ĉi tiu peto estas ekster la kompetenco de oficejoj ĉitieaj"

TIROLO: Laŭ Informleteroj 1,2/52 la preparlaboroj por la starigo de la ZAMENHOF-MONUMENTO pasas laŭplane kaj la mondonacoj por ĝi jam estas konsiderindaj, kio montras, ke la projekto generale renkontas la meritatan intereson. Al la honora komitato bonvolis intertempe ankoraŭ aliĝi: episkopo d-ro Paul Rusch, Innsbruck; prelato Hieronymus Triendl, abato de monaĵejo Wilten; Franz Jonas, urbestro de Vieno; Franz Hüttenberger, viclandestro de Tirolo; Enfrid Malmgren, prezidanto de UEA, Stockholm; d-ro Paul Kempeneers, afergv. vicpres. de UEA, Bruselo, kaj d-ro Siegfried Ziegler, prezidanto de GEA, Munkeno. La pontifika meso okaze de la inaŭguro estos celebrata de prelato H. Triendl. - Novaj E-kursoj funkcias en Wattens (grupestro Otto Steiner) kaj en Bregenz (Vorarlberg) sub gvido de AEF-viclandestro Anton Seiwald. Prof. Hermann Amman daŭrigas la prelegojn de la mortinta s-ano d-ro Blaas en la universitato de Innsbruck. En la Instruista Seminario de Innsbruck s-ano AEF-landestro HansSteiner ekgvidis kurson por 25 studentoj. Kiel jam unufoje antaŭe li faras la kurson malgraŭ la trajndistanco inter Kufstein, kie li dejoras, resp. de Wörgl, kie li logas, kaj la kursloko Innsbruck, pagante ankaŭ la vojaĝadon el la propra poŝo.

E i n l a d u n g

zur 7. ordentlichen Jahreshauptversammlung des Oesterreichischen Esperantisten-Verbandes,

welche im Rahmen der nachfolgenden Veranstaltungen, die am Samstag, den 7. und Sonntag, den 8. Juni 1952 stattfinden, nach Wien 15., Markgraf Rüdigerstrasze 4. einberufen wird.

P R O G R A M M

Samstag, 7.6.52: 16-18 h: Fachsitzungen;
18-19.30 h: Sitzung der AEF-Landesleiter;
19-20 h: Gemeinsames Abendessen;
20- ? h: Amika Vesperao.

Sonntag, 8.6.52: 8.30-9.30 h: Kath. Gottesdienst;
9.30-13 h: 7. orentl. Jahreshauptversammlung des Oe.E.V.;
13-14.30 h: Gemeinsames Mittagessen;
14.30 -18 h: Fortsetzung der Jahreshauptversammlung.

Die Sitzungen finden in den Gewerkschaftsräumen Wien 15., Markgraf Rüdigerstrasze 4 statt. (Straszenbahnlinie 49).

TAGESORDNUNG

der 7. ordentlichen Jahreshauptversammlung des O.E.V.:

1. Eröffnung.
2. Wahl eines Mandatsprüfungs-, eines Antragsprüfungs- und eines Wahlvorschlagskomitees.
3. Tätigkeitsberichte: a) Vorstand, b) Kassier, c) Redaktion, d) Esperanto-Institut, e) Landesleitungen und Delegierte, f) Fachgruppen, g) Landesvertreter: UEA, SAT, IKUE, h) Mandatsprüfungskomitee und i) Kontrolle.
4. Bericht des Wahlvorschlagskomitees.
5. Neuwahl des Verbandsvorstandes.
6. Bericht des Antragsprüfungskomitees. - Beschlussfassung über satzungsgemäsz eingebrachte Anträge.
7. Festsetzung des Jahres-Mitgliedsbeitrages.
8. Programmatische Rede des Verbandspräsidenten.
9. Referat über ide nächste Tätigkeit de Verbandes.
10. Allfälliges. - Schluszwort.

Laut § 16, Punkt 11, der Statuten müssen alle Anträge zur Hauptversammlung schriftlich begründet spätestens 6 Wochen, solche auf Abänderung der Statuten 8 Wochen vor Abhaltung derselben beim Verbandsvorstand eingebracht werden.

Raimund C e c h
Geschäftsführender Obmann

Dr. Hans F r e n z e l
Präsident des Verbandes.

Alfred B e r d a n
Schriftführer.

Auszug aus den Satzungen des Oesterreichischen Esperantisten-Verbandes

§ 15. Verbandsdelegierte.

1. Vereinigungen üben ihr Stimmrecht bei den Hauptversammlungen und ausserordentlichen Hauptversammlungen nur durch Delegierte aus. Sie haben zu diesem Zwecke auf je angefangene 30 Mitglieder für die laut letztem Vierteljahresausweis der Beitrag ordnungsgemäsz an den Verband abgeführt wurde, einen Delegierten zu wählen.

2. Da jede Vereinigung bei der Verbands-Hauptversammlung vertreten sein soll, haben diese, im Falle der Unmöglichkeit, einen Delegierten selbst zu entsenden, die Pflicht, dafür Sorge zu tragen, dasz ein von einer anderen Vereinigung entsandter Vertreter die Stellvertretung übernimmt. Es ist auch möglich, die Verbandsleitung zu ersuchen, für die Vertretung das Nötige zu veranlassen.

3. Den Delegierten (auch deren Stellvertretern) ist von ihrer Vereinigung eine ordnungsgemäsz ausgestellte Legitimation über ihr Mandat und die Anzahl der vertretenen Mitglieder einzuhändigen.

4. Die Delegierten stimmen mit der von ihnen vertretenen Mitgliederzahl bei allen Abstimmungen ab.

5. Die Delegierten sind mindestens 4 Wochen vor Beginn der Hauptversammlung der Verbandsleitung bekanntzugeben.

§ 18. Die ordentliche Hauptversammlung.

4. Die Teinahme ist jedermann, auch Nichtmitgliedern gestattet.

5. Als stimmberechtigt erscheinen jedoch nur:

a)der Verbandsvorstand mit allen seinen Mitgliedern.

b) alle Landesleitungen,
c) der Kontrollausschusz,
d) die Delegierten mit der Zahl der von ihnen vertretenen Mitglieder,
e) Einzelmitglieder, sofern sie nicht bereits durch einen Delegierten vertreten sind.
6. Alle nicht unter Punkt 5 genannten Teilnehemer haben nur beratende Stimme.

D e l e g i t o j: La land- kaj grupestraroj de AEF estas petataj,elekti senprokraste siajn delegitojn por la jarkunveno kaj sciigi ties adresojn tuj al la E-Centro. La delegitoj mem alportu subskribitajn rajtigilojn por la balotado.Krome la estraroj bonvolu koncepti la raportojn kiel eble plej koncisaj,por la legdaŭro de maksimume 10-15 minutoj, por ke estu garantiita la necesa tempo por la traktado de la laboro farota. -- Reprezentantoj, kiuj deziras gaste noktresti ĉe Vienaj ges-anoj, bonvolu tiurilate skribi al E-Centro ĝis lastdate la 5a de majo.

Proponoj: estu sendataj ĝis plej malfrue la 15a de majo!

Raportojn pri agado la estraroj bv. baldaŭege sendi al la AEF-landestroj.
*** *** *** *** *** *** *** *** *** ***

LABORISTA ESPERANTISTARO

Vojo kaj celo de la nova Internacio estis la temo de E-parolado de k-do d-ro Grimme, kiu okazis en la kunveno de la Socialista E-istaro je la 26.1.52 en la E-Centro. Dum priparolado de la organizaj aferoj k-do Haberl iniciatis, ke ni partoprenu al la Internacia Renkonto de la Socialistaj Gejunuloj en Vieno. Ĝi okazos de la 1.-10. 7. 1952 sur la tereno de Hörndlwald kaj ni havos la okazon, starigi en la tendaro propran Esperanto-tendon, kiu servu kiel informejo de la organiza estraro kaj kiel ĉelo por nia E-propagando inter la gejunuloj. La propono estis akceptata kaj oni decidis, delegi k-don Haberl kiel reprezentanton de la Soc. E-istaro al la junulara estraro. La bone sukcesinta kunveno estis finata per kantado de socialistaj kaj migrulaj kantoj.

Memore al la 12a de fabruaro 1934

la Socialista E-istaro de Vieno aranĝis la 15.2.52 en la klubejo de HARMONIO kunvenon, kiu,malgraŭ la ega neĝventado, kunigis kvindekon da gek-doj.

LA SINDIKATA LIGO subvenciis per S 2.000 la kulturan agadon de la Socialista E-istaro inter la laboristaro sur la lingva kampo. La socialistaj E-istoj do ekde nun povos pli aktive labori. Al la estraro de la Sindikata Ligo ni elkore esprimas nian sinceran dankon.

La Ia de Majo estas bonega okazo por ni, publike propagandi por la uzado de E. inter la laboristaro. Gek-doj,preparu vin jam nun por tiu fasto kaj kunmarsu kun la grupo de la soc. E-istoj!La Vienaj gek-doj kiel lastjare kolektos sin en du grupoj. La unuan formos la grupo "Libereco" ĉe la Kolektloko de la XIIa distrikto (vidu la indikojn por la Ia de majo en "AZ") kaj kun ĝi marŝos la gek-doj de la najbaraj distriktoj. La dua grupo el la cirkaŭaj distriktoj kolektiĝos je la 8a angule de Lerchenfelder-, Museum- kaj Auerspergstrasze (tramlinio2) kaj enviciĝos inter la E-grupo de la XVIa distrikto,venonta kun la demonstracio el Ottakring.Kunportu E-flagojn kaj -flagetojn! Ni marŝos la Ian de majo por nia devizo: "Per Esperanto por la socialismo!" Partoprenu certe, gekamaradoj, ni atendos vin! LA ESTRARO

DE LA SOCIALISTA ESPERANTISTARO

* * * *

PERANTO POR "EL POPOLA ĈINIO" nun ne estas kdo Haiderer, sed kdo Antonio B a l a g u e, St.Pölten, Kirchenweg 12. -- "DER ABEND" de 1'15.2.52 publikigis foton "Ridanta junularo en Peking" kun la fontocito "Foto: Esperanto-presservo".

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

AKLE-Vieno: leteradreso: W. Mudrak, Vieno 3., Beatrixg. 19/9; grupo "Estonteco"-Salzburg: adreso: Domvikar J. Kaps, Salzburg-Parsch, Gaisbergstr. 7.

Ankoraŭfoje ni atentigas pri la aranĝo de la katolikaj E-istoj dum la Gesamtösterreichischer Katholikentag en Vieno, 11.-14.9.nj. (Diservo, festkunveno, ev. E-ekspozicio. Bonvolu anonci vian venon ĉe la nomita adreso!-

Eŭkaristiaj E-Mondkunvenoj(E.E.M.) okazos en kadro de la XXXVa Internacia Eŭkaristia Kongreso en Barcelono (27.5.-1.6.52). Interesti0j E-istaj, volontaj partopreni, turnu sin al s-anino Maria Jung, Avda Jose Antonio 470, Barcelono, Hispanio. -- AKLE-Vieno arangis "Gajan Horon", karnavalmarde (25.2.). Kontribuis ges-anoj Gasperini, Kaes, Niesinger, Wildner kaj Schreiber (lastnomita precipe per vigla E-kantado). Ĉeestis 30 ges-anoj. -- Presis pri E.: "OFFENES WORT" I-III/52: 35linian recenson kun Ecitaĵoj de la E-verko "Papo Pio Xa" de d-ro Halbedl; "WIENER KIRCHENBLATT", resp. "DER FELS"(24.2.) 9 liniojn pri la distingo de d-ro Halbedl pro la nomita verko per la Papa beno.

W.M.

POŜTISTA FAKGRUPO: En la fakgazeto "POST UND TELEGRAPHIE" (15.2.52) ni legis unukolonan artikolon en la t.n. "E-angulo" pri nia lingvo. Ĝi entenis ankaŭ foton de nia kolego-fakgrupestro Johann Janecka, sur kiu li portas la E-dejorinsignon, pri kiu ni raportis en la antaŭa AER. S-ano Johann Janecka, Vieno 19., Diemg.3, estas ankaŭ la reprezentanto de INTERNACIA LIGO POR ESPERANTO EN POŜTOJ?TELEKOMUNIKOJ KAJ TRANSPORTOJ(ILEPTO).

SOCIETO DE AUSTRIAJ E-INSTRUISTOJ (sekcio de AEF) sciigas, ke ĝi ricevis de la urblerneja estraro sw Vieno la permeson, fari paroladojn pri la signifo kaj kultura valoro de E. en ĉiuj Vienaj instruistaj seminarioj. - Ĉiuj E-kursgvidantoj estas petataj, tuj sendi al ĝi (I., Neutorg ,9) ĉiujn necesajn datojn kaj indikojn pri siaj kursoj. - La urblerneja estraro de Vieno aranĝas de 17.5. - 15.6.52 en Messepalast, Vieno VII., grandan elpozicion, por montri la sukcesojn dum la rekonstruo de la Vienaj lernejoj. S-ano ĉeflerneja instruisto Konecny estis oficiale komisiata, aranĝi la E-fakon de ĉi tiu ekspozicio. - "OESTERR=PAEDAGOGISCHE WARTE" I/52 akceptis 2 1/2pagan artikolon de s-ano instruisto Johann Kainz pri la esenco kaj signifo de E. Gratulon kaj dankon al li pro la sukceso! - Ĉiuj E-instruistoj kaj -instruantoj estas invitataj, aligi al la societo!

* * * *

I N T E R N A C I A E S P E R A N T O - M O V A D O

Zigzage kaj telegrame tra la mondo

Post plurjara propagando de d-ro Jules Bonge, UEA-delegito, kaj rapida, sed efika kampanjo de s-ro Tibor Sekelj, UEA-reprezentanto, fondiĝis nun LANDA ASOCIO EN GVATEMALO. -- La 4a IFEF-KONGRESO, kiu okazos en Lindau, Germanio, je 25.-30.5.52, anoncas provizoran kongresprogramon, kiu enhavas fakprelegojn, vizitojn al riparejo, balon, laborkunsidojn, komitatajn kunsidojn kaj ekskursojn. Limdato por aliĝo: 15.4.52. Adreso:4a IFEF-Kongreso, Eisenbahndirektion, Museumstr. 39, Hamburg-Altona. - La 8a JARKUNVENO DE TUTMONDA JUNULAR ORGANIZO okazos de 10.-17.8.52 en Ry, Danlando. Limdato por aliĝoj: 1.7.52. Adreso de la Organiza Komitato: Brønshøjvej 62, Brh., Kopenhago. -- La konata usona ilustrita gazeto "LIFE" aperigis varbprospekton por sia internacia eldono parale en angla kaj Esperanta lingvoj. - LA HUNGARA PROVINCO estas la titolo de belege ilustrita prospekto en E., 28 pĝ., eldonita de "IBUSZ", Hungara Informa Kontoro por Fremdultrafiko, Budapest, VII.,Lenin-körut 67. Oni verŝ devas gratuli al la eldona oficejo pro ĉi tiu bonega kaj modela turisma propagandilo. HUNGARIO, alia prospekto, same solida, estis egale eldonata de la supra oficejo. Ambaŭ prospektoj ne nur varbas por vizito de Hungario, sed ankaŭ por la uzo de E. --- KULTURA DOMO DE ESPERANTISTOJ EN FRANCIO estis ĵus fondata. La francaj E-istoj aĉetis belan kastelon (ni imagas vilaegon, red.), kiu estos je dispono de la s-anoj por E-somerkursoj kaj internaciaj renkontoj. Ĝi jam ellaboris programon kun kursoj, seminario. Ĉio okazu kun distroj kaj ekskursoj. Speciale bonvenaj estas nefrancaj ges-anoj. Pro informoj vin turnu al f-ino Jeanne Dedieu, 3, rue Arzac, Toulouse. -- La 24a NACIA KONGRESO DE ITALAJ E-ISTOJ okazos 6-9.9.52 en Bologna. Adreso: E-ista grupo "A.Tellini", Via Borgonuovo 16, Bologna. - INTERNACIA E-INFANEJO estas projektata en la germana urbo Düsseldorf antaŭ la kongresoj de UEA kaj SAT de 19.7.-2.8.52. -- Laŭ raporto de la organiza kaj propaganda fako de Germana E-Asocio okazis en Germanio post la UEA-Kongreso en Munkeno en 30 urboj 85 prelegoj de T. MEGALLI kun preskaŭ 15.000 ĉeestintoj. --

HANS JAKOB, la redaktoro de "Esperanto", 60-jarigis la 15.12.51. D-ro KOLOMANO KALOCSAY, nia granda poeto, festis la 6.10.51 sian 60an naskigtagon. -- Jus aperis en E. la majstroverko de Ibsen "PEER GYNT", mendebla ce Esperantoforlaget A/S, Boks 942, Oslo. --- Ni registras krome la aperon de la libro "Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo", originale verkita de d-ro Ivo Lapenna, mendebla ce Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Nederlando. -- INTERNATIONAL FRIENDSHIP LEAGUE (Ligo por internacia amikeco) prove arangos ferian centron apud Oslo dum la UEA-kongreso 1952. Tie oni parolos nur E. Se la eksperimento bone sukcesos, oni intencas uzi pli ol gis nun nian lingvon por internaciaj kontaktoj. - Kelkaj studentoj de la agrikultura fakultato ce la Nihon-universitato en Japanio doktorigis per tezoj, publikitaj en E. En pli ol 30 universitatoj kaj 50 mezgradaj lernejoj de Japanio estas E-grupoj. -- Por servi al la vizitontoj de la UEA-kongreso en Oslo Scandinavian Airlines System eldonis denove faldfolion en E. ---- La originala E-verko de s-ano James D. Sayers "Invito al Cielo" fine de oktobro 1951 aperis en finna traduko. Gi tuj kreis sensacion kajliteraturaj autoritatoj parolas pri granda sukceso por "Kutsu Tähtiin", kiu estas la finnlingva titolo de la libro. Recensistoj de plej grandaj finnaj jurnaloj antauvidas rekordan eldonnombron de pli ol 100.000 eksempleroj. La sama libro baldau aperos angla- kaj germanlingve. --- La kotizo por KELI (KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA) estas 20 resp. kup. inkluzive la belega organo "Dia Regno". Abono de la gazeto: 17 resp. kup. Mendu ce Centra Kaso de KELI, Karin Larsson, Hällabrottet, Svedio. - Dansk Esperanto-Blad 1-2/52 enhavas BIBLIOGRAFION PRI DANA LITERATURO, tradukita en E. Gi enhavas 355 titolojn de 94 autoroj kaj 57 tradukintoj. Ne malpli ol 177 poemoj estas registritaj. La kolekto ne estas konsiderata kompleta. -- Ankau danaj E-istoj organizis solidaran helpon al la viktimoj de la Po-inundo (austrianoj vidu la apelon de s-ano NIGL en AER 1-2/52, p. 7!). ---- INTERNACIA KONFERENCO DE E-STUDENTOJ KAJ ALTLERNEJANOJ okazos en Schluchsee, Germanio, de 17.-24.8.52. Adreso de la preparkomitato: I.K.E.S.A., Laksegade 35, Kopenhago-K. (J. Vesterland-Andersen). --- ITALA TURISMA KLUBO

---

eldonis faldprospekton en E. kun multaj utilaj indikoj por vojaĝontoj al Italio. Adreso: Milano-Corso Italia 10.

* * *

DONACOJN por la Esperanto-Centro: S-ano Ebner Friedrich, Klosterneuburg: S 50.
por la Zamenhofmonumento: S-ano Ebner: S 10.

VARBFOLIOJN aĉetis: grupo Innsbruck por S 10.
grupo St. Pölten por S 10.
S-ano A. Postl por S 8.

* * *

En la Esperanto-eldonejo
"T R A M O N D O"
Vieno I., Neutorgasse 9

estas inter aliaj havebla jenaj libroj:

Faŭsto I	S 39.--
Leteroj de Zamenhof	S 49.--
Leteroj de Lanti	S 20.--
Vivo de Rosa Luxenburg	S 33.--
Plena Vortaro (de S A T)	S 85.--
La nuna stato de l' evoluismo	S 15.--

G u t e B ü c h e r bekommt man in jeder Buchhandlung. Warum sollst Du trotzdem a l l e B ü c h e r nur bei T R A M O N D O , Wien I., Neutorgasse 9, Tel.: U 23180, besorgen? Weil Du damit die Esperantobewegung förderst!!

* * * * * * * * * * * * * * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a.